

Monata informilo de Sovetia Esperantista Junulara Movado

La agadjaro 1976/77

N^o3(36)

Novembro

LABORPLANO DE LA SEJM-KOMITATO
por la agadjaro 1976/77

N ^o	Aktiveco	Respondecaj komitatanoj (fakestroj)	Limdato
1.	Ellabori specialan kriteriaron por socialisma konkurado de fakoj kaj servoj	Jegorovas, Sapoŝnikov	dum la jaro
2.	Kontroli formadon de fakaj laborgrupoj	Sapoŝnikov	ĝis la 1-a de januaro
3.	Kompili kalendaron de fakaj renkontiĝoj kaj aperigi ĝin en "Aktuale"	Sapoŝnikov, Gilinskij, Aroloviĉ	ĝis la 1-a de decembro
4.	Esplori eblecojn pri fonda de Interlingvistika fako	Sapoŝnikov, Aroloviĉ	ĝis la 1-a de oktobro
5.	Ellabori perspektivan 5-jaran laborplanon surbaze de la dumkonferen/caj proponoj kaj aperigi ĝin en "Aktuale"	Melnikov, Aroloviĉ	ĝis la 1-a de januaro
6.	Ellabori novan Taksan Demandaron	Jegorovas	ĝis la 15-a de oktobro
7.	Kontroli la kotizpagadon kaj raportadon por la 1-a agadperiodo	Gibulevskij, Jegorovas	ĝis la 1-a de februaro
8.	Reeldoni Jarlibron, Varbfolion, Instruclian Leteron	Jegorovas	ĝis la 1-a de decembro
9.	Ellabori planon de propagandaj aranĝoj en SEJM-skalo kaj aperigi ĝin en "Aktuale"	Sapoŝnikov, Aroloviĉ (Medinŝ)	ĝis la 1-a de januaro
10.	Ellabori buĝeton de SEJM	Melnikov, Gibulevskij	ĝis la 1-a de novembro
11.	Kontroli raportojn pri renkontiĝoj kaj proponi konkurojn	Gilinskij	dum la jaro
12.	Publikigi kalendaron de renkontiĝoj en "Aktuale"	Gilinskij, Aroloviĉ	ĝis la 1-a de oktobro
13.	Kontroli organizon de la interregionaj tenderoj	Gibulevskij, Sapoŝnikov, Gilinskij	dum la jaro

14.	Esplori eblecojn pri partopreno de SEJM-aktivuloj en eksterlandaj E-aranĝoj en 1977	Melnikov	Ĝis la 1-a de januaro
15.	Kontroli ellaboron de unueca programo por paroligaj periodoj	Gilin/skij, Sapoĵnikov (Smetanina)	Ĝis la 1-a de marto
16.	Viziti gvidantojn de SSOD kaj ties E-Komisiono	Aroloviĉ, Cibulevskij	Ĝis la 1-a de januaro
17.	Finpretigi kaj eldoni Jubilean Libron pri SEJM	Jegorovas, Bronštejn, Aroloviĉ, Melnikov	Ĝis la 1-a de januaro
18.	Organizi kunsidojn de la Komitato	Aroloviĉ, Cibulevskij	dum la jaro
19.	Kontroli eldonon de la nova SEJM-kantaro	Sapoĵnikov (Vizgirdas)	dum la jaro

La plano estas kompilita surbaze de la Decidoj de la jubilea 10-a Konferenco de SEJM-Konsilantaro.

SEJT-18: NOTOJ PRI NUANCOJ...

& "La tendaro estas unika okazo por starigi novajn kontaktojn. Utiligu la tempon por ne bedaŭri poste." (A. Gonĉarov)

& Pri nia prononco. **D i a b l o , k r o k e d i l o ...** estas sufiĉe popularaj vortoj. Tamen eĉ multaj spertuloj prononcas ilin nekorekte.

& La statistiko elokventas pri vera internacieco (multnacieco) de la lasta SEJT. Tre simpatie aspektas junaj esperantistoj en la naciaj vestoj. Sed dume ni malmulte vidis dum la tendaraj festoj la naciajn dancojn, ne tre ofte sonis popolkantoj en la internacia lingvo.

& Junularan tendaron kutime partoprenas ankaŭ veteranoj. Estas agrable vidi sur iliaj brustoj ne nur verdajn steletojn, sed ankaŭ militordenojn. Tamen sur la brustoj de junaj esperantistoj ĉu ofte oni povas vidi almenaŭ komsomolan insignon? Ja tio gravas, geamikoj, por vera impreso pri ni flanke de la oficialuloj, flanke de la neesperantista publiko.

& Gratulojn al la novelektita redaktoro de "Aktuale"! Mia persona bondeziro: plue la bulteno estu ne tro "profesi-nivela"; troviĝu loko ankaŭ por diversaj ideoj de la legantoj.

(Danke pro la gratuloj! La paĝoj de nia informilo estas ĉiam malfermitaj por utilaj ideoj. - La red.)

& En duonŝerca formo estis organizita en la tendaro "loko por perditaj aĵoj". Evidentiĝis praktika utilo de ĉi tiu iniciato, ĉar pro tio multaj aĵoj feliĉe revenis al siaj perdemaj mastroj.

& Organizontoj de estontaj tendaroj, bonvolu daŭrigi la bonan tradicion - loterion kun donacitaj esperantaĵoj kaj etaj suveniroj.

& Bedaŭrinde forestis enketado. Tre grava, ekzemple, estas la demando: "Kiel fari la kluban agadon pli interesa, pli fruktodona?". Amasaj respondoj nepre riĝigus nian kolektivon sperton.

& Okazis improvizitaj disputoj pri diplomatio kun la oficialaj instancoj. Atentinde diris unu kamarado: ĉu interparoloj kun la oficialuloj ni diru ne "p e r m e s u", sed - "helpu", "kontribuu".

& Dum la vesperoj sentebliis defecito de ... kontraŭkula rimedo, polianternoj; dum la pluvoj mankis polieŝileno por savi la ekspoziciaĵojn. Partoprenontoj de estontaj tendaroj, konsideru ankaŭ similajn detalojn.

V. Ĉernov (Kaluga).

ASARA ESTAS SIMBOLO DE LA AMIKECO

La 8-an - 31-an de aŭgusto 1976 en bulgara urbo Marica okazis la III-a Internacia Esperantista Arkeologia Junulara Brigado. Pri ĝi estas mia rakonto.

...Jen ĉiuj klopodoj estas malantaŭe. Jen estas Bulgario - lando de la suno kaj unu el plej konvenaj landoj por Esperanto-movado. Nia trajno venis al limstacio en profunda nokto. Sed oni devas veturi plu. Kion fari? Unua bulgaro, al kiu mi turnis min, tre detale rakontis al mi, per kiu trajno mi devas veturi.

Kiam nia trajno proksimiĝis al la stacidomo Marica, jam el la vagono mi ekvidis grupon de homoj kun verdaj flagoj kaj insignoj. Certe tiuj estis geesperantistoj de la urbo Marica, kiuj venis por renkonti partoprenontojn de la Brigado. Dum la vojo al nia loĝejo en teknikumo mi rapide interkonatiĝis kun la geesperantistoj. Poste Kenĉo Todorov kaj lia frato Jivko iĝis miaj plej bonaj amikoj. Mi kaj aliaj brigadanoj ofte kolektiĝis en ilia hejmo.

Entute la Brigadon partoprenis 80 homoj el Bulgario, Pollando, Sovetunio (nur du, la alia partopreninto estis Boris Zozulja el Rostov-Don), Hungario, Ĉeĥoslovakio, Anglio, Jugoslavio, Belgio, Irano. Nia brigado portis la nomon de la kreinto de nia kara lingvo L.L. Zamenhof.

Sekvan/tan matenon post la alveno ni ellitiĝis je la kvina matene kaj per autobuso veturis al la loko de nia laboro, kiu nomiĝas Asara. Ĝi estas loko sur natura altaĵo, kie antaŭ multe da jarcentoj, ĉirkaŭita per fortikaĵa muro, situis loĝloko de antikvaj trunkianoj, kiun oni konstruis en la kvina jarcento. Kaj jen dank' al la iniciato de BEJ (Bulgara Esperanto-Junularo) kaj regiona muzeo en la urbo Ĥaskovo nia brigado komencis la esplorfosadon de Asara.

Nia laboro estis jena. La tutan esplorfosendan placon oni dividis je kvadratoj, ĉiu kvadrato estis 5x5 metrojn kaj 2 metrojn profunda. De komenco ni laboris per fosiloj kaj pioĉoj; poste, kiam iu trovis keramikaĵon aŭ ion alian, ni uzis penikojn kaj tranĉilojn, por ne difekti la objektojn. Jam kelkajn tagojn post komenco de la esplorfocado ni povis trovi multe da keramiko, moneroj kaj diversaj aliaj objektoj de la antikvuloj.

Pri la Brigado multe skribis la lokaj kaj centraj ĵurnaloj de Bulgario, pri ĝi oni rakontis ankaŭ per TV. Tre memorinda estis la malfermo de la Brigado. Al ni venis gvidantoj de Esperanto-movado el Ĥaskovo. Dua sekretario de Ĥaskova regiona komitato de Bulgara Komunista Partio enmanigis al la estro de la Brigado standardon. Kun tiu standardo ni marŝis al tombejo de bulgaroj, pereintaj dum la jaroj 1941 - 1945, kaj metis florkronojn al la tomboj. Tie okazis mitingo, dediĉita al pereintoj por la libereco de Bulgario.

Ĉiun vesperon en nia brigado okazis io interesa. Ni spektis la sovetajn filmojn "Dersu Uzala" kaj "Nu, atendu!", ankaŭ sovetan pejzaĝan filmon en Esperanto. Ĥaskova ensemblo de popolaj muziko kaj dancado prezentis al ni tre bonan koncerton. Tre interesa estis la vespero de internacia amikeco kun maskobalo ktp. La geesperantistoj povis ankaŭ perfektigi sian Esperanton en kursoj, kiuj estis organizitaj en la Brigado. Dum dimanĉoj kutime okazis ekskursoj al aliaj urboj kaj vilaĝoj. En la urbo Dimitrovgrad kune kun la lokaj geesperantistoj ni metis florkronojn al la monumento de la kreinto de Esperanto, kaj tie okazis malgranda mitingo.

Por la brigadanoj la mastroj faris bonajn kondiĉojn por la laboro, ripozo kaj perfektigo pri la lingvo. Ĝiu partopreninto de la Brigado post la restado en Bulgario forportis, krom la suveniroj, ankaŭ plej bonajn rememorojn pri la Brigado. Mi konsilas al SEJM-aktivuloj peni venontsomere trafi tiun Brigadon. Vi certe pri tio ne bedauros.

I.Koroljov, subtenanto de SEJM (Bijak).

ESPERANTO-NOVAĴOJ EL LATVIO

1. La 16-an - 17-an de oktobro okazis tradicia junulara renkontiĝo de du junularaj E-kluboĵ de Riga kaj Tallinn, kiuj regule ĉiujare interŝanĝas vizitojn. Ĉi-foje al Tallinn venis 12-persona grupo el Riga Esperanto-Junulara klubo (REJK). La alveturantojn jam en la fervoja stacidomo gastame atendis reprezentantoj de Tallinna E-klubo sub la gvido de August Kilk kaj Einar Meistar. La estonaj gesamideanoj konatigis nin kun la plej interesaj lokoj en ilia antikva ĉefurbo.

Poste en la klubejo de la tallinnanoj estis organizita E-seminario, kiun partoprenis ankaŭ la gvidantoj de la E-movado en Estonio J.Ojalo, H.Pill, V.Kruusalu kaj aliaj eminentaj estonaj gesamideanoj. Ili multe rakontis al ni pri sia klubo, ĝia agado, E-instruado en lernejoj, pri la vigla eldonagado. Rakonton pri la Tallinna Esperanto-klubo faris J.Ojalo, pri la junulara sekcio E.Meistar, el Latvio reciprokis la prezidanto de REJK T.Bercis kaj la respondeculo pri Propaganda fako A.Mediņš.

Post la oficiala parto okazis vespero plenplena de prezentaĵoj, kantoj, ludoj kaj dancoj.

La renkontiĝo estis tre interesa kaj fruktodona por ambaŭ kluboj, kaj la interŝanĝita sperto nepre helpos al niaj kluboj pliefektivigi la priesperantan agadon en niaj najbaraj respublikoj.

2. La 30-an de oktobro Riga Esperanto-klubo aranĝis solenan honorigon de du eminentaj latvaj gesamideanoj okaze de ilia 75-jariĝo - Amalija Gruike kaj Eduardo Jaunvalks, prezidanto de Riga Esperanto-klubo, kunautoro de Latva-Esperanto kaj Esperanto-Latva vortaro.

3. La organo de Ministerio pri klerigo de Latvio - la revuo "Skola un ĝimene" ("Lernejo kaj familio", preskvanto 44.000) publikigis artikolon de latva poeto kaj esperantisto Harijs Skuja "Esperanto eltenas la ekzamenon de tempo" kaj tri tradukitajn fare de li poeziaĵojn de la E-poetinoj Lina Gabrielli kaj Elvira Lippe. La artikolo konatigas neesperantistan leganton kun bazaj faktoj pri Esperanto, skizas la faritan laboron de fervoraj agantoj por Esperanto en Latvio, rakontas pri la originala literaturo kaj la nuna stato de la lingvo.

4. La 25-an de decembro Riga E-Junulara klubo aranĝos letervesperon de internacia korespondado. Estas petataj korespondproponoj, koloraj bildkartoj. Respondo certa. Ĉiun sendinton ni reciprokos per koloraj bildkartoj.

La adreso: SU-226050 Latvio, Riga, p.k. 52, al REJK.

5. Sukcese daŭras varbado por la nova E-kurso, kiu jam tradicie okazos en Domo de Instruistoj. Jam la duan jaron la kurson gvidos A.Danovska. Speciale por la bezono de ĉi tiu kurso Riga E-klubo presis trikoloran afiŝon.

Informis T.Bercis, prezidanto de REJK.

AL LA AŬTOROJ! La indikon "Por 'Aktuale'" skribu super la teksto, sed ne surkoverte - ja ĝi estas ne por la poŝto. V.Aroleviĉ.

VINTRE DORMAS NUR URSOJ

La 3-an de oktobro ekbruis plenforte la vivo en Tjumena E-klubo "Rovo". Post la somero la klubo pligrandiĝis kaj plifortiĝis. La unua kunveno "Ora aŭtuno" havis la sloganon: "Vintre dormas nur ursoj, ni - laboru!". Jen serioze, jen ŝerce pasas akcepto de novaj anoj al la klubo. "7 verdaj ordonoj" malpermesas paroli nacilingve distance je 100 km de la klubejo, ami neesperantistojn ktp. Ĉi tiu ordonaro, kiun oni en manigas al ĉiu nova klubano, alvokas "strebi al la prezidanta posteno"...

Sekvas rakontoj pri la someraj vojaĝoj, nome pri BET-17 kaj SEJT-18. Ja 15 homoj el nia klubo ripozis esperantmaniere. La plej ĉefa atingo de la tendaroj, laŭ nia komuna opinio, estas tio, ke ili helpis multajn perfektigi en la lingvo, kompreni seriozecon de la E-movado. Niaj komencantoj eksentis mem Esperanton, ekparolis flue kaj iĝis veraj esperantistoj.

Por ĉi tiu jaro ni planas aron da aranĝoj. La 29-an de oktobro okazis vespero, dediĉita al la 3-jara jubileo de nia klubo, en novembro pasos poezia vespero, kaj certe ni celebros la naskiĝtagon de Zamenhof. La jaron 1976 kronos "Lazura tajgo", kiam venos esperantistoj de tuta Tjumena regiono.

En la klubo funkcias 3 sekcioj: pri metodiko de la E-instruado, korespondado kaj organizo de vesperoj. Samtempe la klubanoj studas en perfektiga kurso.

Ekster la klubo ni organizis 4 grupojn por komencantoj en la urba palaco de fervojistoj. Nur dum oktobro ni faris 20 prelegojn! Krome, ĉi tiu monato neforgeseblas pro tre grava evento - okazis oficialiĝo de la klubo!

Oni diras, komenco bona - laboro duona. Ni esperas, ke oktobro estas nur komenco de nia granda laboro.

D. Mametova (Tjumenj).

SE EFEKTIVE SEJN BEZONAS LA HISTORION

La 4-an - 7-an de novembro d-ro M. Isajev estis gasto ĉe E-Konferenco en Kulturligo de GDR. Tie dum prelego de unu s-ano, laboranto de instituto ĉe la partia CK en Hungario, aperis tute neatendite temo, kiun oni opiniis jam historio - IDO. Desegnante duĝiban kurbliĝon kiel disvolvon de interlingvistiko, li montris, kiel la E-movado sin levis sur la ŝultroj de la pereinta Volapük kaj kiel la samon povos atingi Ido, se ni restos indiferentaj. Ni ne komparu Esperanton kaj Ido kun elefanto kaj hundetaĉo - Ido pli similas al muŝo, kiu bone scias kiel mordi por vundi la elefanton... Post tio li indikis, ke unu idisto elpaŝis en la Moskva problema grupo pri interlingvistiko kaj tio kaŭzis leteron de unu grupano al Skandinavio, en kiu li certigis, ke la problema grupo de Isajev intencas subteni ne Esperanton, sed Idon.

- Verŝajne, mi eraris, donante podion al nia idea malamiko idisto, - konfesis al mi Isajev. - Tamen mi ne allasis, ke la prelego aperu en nia "Problemi interlingvistiki". Mi estis malsana, kiam min vizitis la grupano kun postulo enigi tien la artikolon pri Ido. Mi respondis: "Vi povas min mortigi, sed mi nenion faros kontraŭ mia konscienco"... Ido estas troekismo en interlingvistiko - tiuj vortoj de nia kara gvidinto E. Bokarev restas por ni sanktaj.

Do Ido aperis denove. Aŭ pli precize, tiu nia malamiko neniam malaperis. Kelkaj historiaj ekzemploj. Dum la civitana milito unu el la idistoj, Titov, nuligis streĝan laboron de S. Obruĉev kaj aliaj en Narkompros pri enkonduko de Esperanto en lernejojn. Kvankam la narkomo mem, nome Lunaĉarskij, favoris al Esperanto, lin trompis la ŝildo de Ido, kiel "Esperanto science reformita". Kaj oni sin

detenis de la enkonduko. Duan frapon la idistoj donis al ESKI, E-sekcio de Kominternio. Demando pri Esperanto jam estis en programo de unu el ĝiaj kongresoj (kompreneble, ne sen aprobo de Lenin, kiu gvidis la kongreson persone), tamen influiva idisto atingis certan instancon. Kaj jen respondo de Rakoŝi, tiam sekretario de Kominternio: "Do ekzistas alia, ne sola lingvo internacia". En la organizacio ne estis interlingvistoj, kiuj povus juĝi, kaj la demando pri Esperanto neniam aperis dum la kongresoj de Kominternio.

En la dudekaj jaroj la idistoj tiom lerte atakis Esperanton, ke Drezen eĉ proponis akcepti ilin sub la tegmento de SEU por iel bridati, li eĉ serĉis ĉe ili iun utilon. "La sola afero, kiun ili faris dum la tuta historio, estis ilia batalo kontraŭ Esperanto" - tiuj vortoj de Podkaminer aperis en "Mejdunarodnij jazik".

La jaro 1956, Bokarev parolas en CK. Aprobante komencan de lia laboro, funkciulo de CK mencias iun Idon. "Ekzistas nur unu vivanta lingvo internacia, ĉiuj ceteraj - nur projektoj" - la aŭtoritato de Bokarev efikas.

Lastaj jaroj. La respondeculoj en SSOD parolas, ke Esperanto ne estas sola lingvo internacia. Ili trovas eĉ spongon de unu-du lingvistoj, kiuj objektivisme ŝvebas super la batalo.

Mi ne timigas, sed estas ĉagere, se nia problema grupo transformiĝos al organo, en kiu la viva lingvo apudus kun homunkloj. Ja ni ĉiuj kontribuas al tia estonto. Per nia nenifarado. Per degna rilato al niaj malamikoj. Gončarov kaj B.Kolker, ĉu ne vi senkritike aŭskultis en Karpatio prelegon pri "duonfrataj movadoj" fare de Jauŝkin el Kazanĵ? Ĉu ne ni indulgeme akceptas kanton de Lukjanec, ke ne gravas, ĉu Ido, ĉu Esperanto, "gravas nur, ke la anim' havu ion por esprimi"? Ĉu ne mi, A.Harkovskij, estis tro afabla kun unu kaŝita idisto?

Tamen mi ne volas sekvi senkritikon de papago kaj korektos la eraron. La grupo de Isajev planas eldoni monografion "Sovremennije problemi mejdunarodnogo jazika", plene dediĉitan al Esperanto, en 1979 - 80. Do mi verkos por ĝi artikolon pri la historio kaj la nuna stato de Ido-movado. Por tio mi bezonas kunlaboron el Riga, Harkovo, Zaporozĵje, ĉar ĝuste ĉe ili aŭ apude konserviĝis iuj aktivaj idistoj. Estas bezonata interlingvistika kritiko de Ido kun prelego en la problema grupo de Isajev (oponanton mi garantias). Ĉu B. Kolker surŝultros la aferon? Lia kandidateco estas aprobita de Isajev.

D.Cibulevskij en "A" №35 proponis, ke mi disdonu temojn pri historio al la kluboj. Mi faros tion tuj, tamen antaŭe unu rimarkon: el la E-historio mi elektas nur tiujn urgajn temojn, kiuj servu kiel amilaro en nia nuna laboro. Do:

Leningrad, Tĵĵvin: 1) "Juĝproceso" kontraŭ Postnikov en la jaro 1911 - ĉu ĝi estis kontraŭesperanta? 2) SAT-Kongreso en la jaro 1926. La unua - en arkivoj, la dua - en revuoj kaj en la kapoj de E-veteranoj.

Harkovo: 1) La E-movado en la 20-aj - 30-aj jaroj en Ukrainio kaj favoro flanke de la respublika Narkompros. 2) Jazikofront kaj Marr, batalo en la 30-aj jaroj.

Kartvelio: Rememoroj de I.S.Lisiĉnik pri la E-kongreso en Kijevo, 1913.

Krasnojarsk: Esperanto en fora Oriento. Rusaj esperantistoj en Japanio en la 20-aj jaroj (Jeroŝenko, Serišev k.c.)

Ufa: V.I.Lenin, N.K.Krapŝkaja, M.I.Uljanova - ilia rilato al Esperanto.

Doneck: SEU kaj SAT, nuna stato de SAT.

Vilnius: 1) Rilato inter sovetaĵ kaj germanaĵ esperantistoj en la 20-aj jaroj. 2) La E-movado en 1957 - 67 en spegulo de sociologiaj esploroj.

Barnaul, Mejdureĉensk: Estiĝo de la junulara movado (1957 - 67).

Riga: La 10 jaroj de SEJM.

Klaipeda: La E-movado en Ĉebaltio.

Moskvo: "La Ondo de Esperanto" kaj ĝia rolo.

Angarsk: Elstaraj esperantistoj (Drezen, Demidjuk, Nekrasov, S. Obruĉev, Bokarev).

Mi ne daurigas la liston, tamen faras jenan proponon. La plenumotajn taskojn oni publikigu en speciala aldono al "A" (simila al la ST-aldono) por poste broŝurigi kaj konservi nian historion samtempe en kelkaj urboj. La kolekto estu instruilo por la novaj esperantistoj.

Ĉu ni transiru finfine de vortoj al la aferoj? Ĉu ni restu homoj, ne memorantaj pri sia deveno? Ĉio dependas de vi. Ĉu la E-movado bezonas sian historion? Se ankaŭ SEJM ĝin bezonas - de laboru.

A. Ĥarkovskij, estro de Historia fako.

PROVU NI...

Jes, provu ni fari jenajn du aferojn.

I. Plifirmigi (kie ili jam estas) kaj establi (kie ili ĝis nun mankas) intimajn ligojn inter niaj studentaj E-rondoj kaj tiuj de aliaj landoj. Inter pluraj celoj de tiaj kontaktoj estas ankaŭ studenta intersanĝo por:

a) partopreni iajn sciencajn aranĝojn, ligitajn kun Esperanto (aŭ kun certa fako, sed en Esperanto);

b) instrui Esperanton ĉe iuj eksterlandaj 2-3-monataj entendaraj kursoj por studentoj;

c) prezenti aktorarojn kaj aliajn artaĵojn fare de studentaj amatoraj grupoj.

Por ke tiu propono ne estu surpapera, mi petas, ke ĉiuj, kiuj havas ian ajn rilaton al studentaj rondoj, sendu al mi respondojn al la sekvaj du demandoj:

1) Kiu jam havas ligojn kun alilandaj (esperantistaj aŭ ne) studentaj grupoj? konkrete kun kiuj altlernejoj (lando, urbo, nomo kaj adreso de la institutoj)? kiel konkrete efektiviĝas la kunlaboro?

2) Kiu volas proponi al siaj institutaj (universitataj) gvidantoj tiaspecan kunlab/oron?

Helpu al mi akcii la nunan staton, kaj mi helpos al vi ĝin plibonigi.

II. Partoprenigi kelkajn niajn pupteatrojn en PIF (Pup teatra Internacia Festivalo) en Zagreb, Jugoslavio. Por tio necesas:

1) elekti indajn kandidatojn (altkvalifikitajn profesiajn trupojn, aŭ kolektivojn, kiuj elpensis ion novan en la pup teatra arto);

2) kontakti kun mi kaj priskribi la kandidatojn;

3) atendi miajn instrukciojn.

Kelkaj el vi jam havas sperton rilate al PIF. Bonvolu ĝin malsekretigi al mi, por ke mi sciu ĉiujn ĉi-koncernajn precedentojn.

Do, ek al la provoj!

A. Melnikov, unua v/p de SEJM.

REVU-14

La tradicia REVU-14 okazis la 6-an - 8-an de novembro en la urbo Sizraŝj, Kujbiŝeva regiono. Ĝin partoprenis esperantistoj el pli ol 10 urboj.

La 7-an de novembro malfermiĝis konferenco, kie la kluboj raportis pri sia agado kaj intersanĝis sperton. Estis tre multaj deman-

doj al k-doĵ B.G.Kolker kaj V.Aroloviĉ. La diskuto estis daŭrigita dum la bankedo (kiu, devas mi rimarki, estis bonege aranĝita). La sizrananoj preparis por la gastoj E-ekskurson, dum kiu ili konatigis nin kun sia urbo. Bone pasis gaja vespero kun popularaj E-kantoj kaj ludoj.

La 8-an de novembro okazis renkontiĝo kun interesaj homoj. Tiun ĉi renkontiĝon partoprenis pentristo A.D.Ĥovanskiĵ, kiu montris al ni siajn bildojn kaj rakontis pri ili, aŭtoro de la libro "Urbo Sizranj" historiisto B.P.Dedkov. Pri la unuaj sovetaj jaroj en Sizranj rakontis malnova revoluciulo S.I.Akifjev, kiu estis ano de la 25-a divizio de Ĉapajev. Parolis ankaŭ Z.D.Skvorcova pri la E-Kongreso en Bulgario.

Dankon al la mastroj pro la varma gastamo kaj interesa programo de la renkontiĝo.

G.Simonova (Ĉeljabinsk).

PRI LA TITOLO DE NIA URĜA INFORMILO

Mi ricevis unuan folieton de nia nova ekspres-informilo. Ĝia apero estis stendata, ĝia apero estas necesa. Tamen multajn el ni malagrable impresis la titolo de tiu ĉi informilo. Grandlitere okulpikis: "KURTE" - malbela, kontraŭfundamenta vorto.

Ni rememoru. Jam multfoje la esperantistaro interdiskutis pri la problemoj de senbezonoj kaj neologismoj, pri aperado de senĉesaj "turpa", "olda", "lanta", "kurta" kaj similaj. Kaj jen per la lasta menciita estis titolita nia SEJM-informilo. Kiel povis okazi tio?

Pasintjare laŭ persona malpermeso de tiama prezidanto de SEJM la diskuto pri senbezonoj kaj neologismoj sur la paĝoj de "A" estis ĉesigita. (La aŭtoro ne tute pravas: fakte la diskutĉesigon iniciatis la redakcio mem, kun aprobo de la prezidanto kaj aliaj komitatanoj. - La red.) Mi povas lin kompreni. Li ne volis superfluan bruon, li volis, ke en lia granda mastrumo ĉio estu glata kaj paca. Same struto kaŝas la kapon en sablon por ne vidi danĝeron. Sed la danĝero ja restas - la senbezonoj kaj neologismoj minacas al la estonto de Esperanto! Multaj pensantaj homoj avertas pri tio.

Oni diras - anstataŭismojn (neologismojn) bezonas poetoj. Dubinde, tamen se iu versfaranto uzas senbezonan anstataŭismon, eble pro tio, ke li ne havas sufiĉe da kapablo, - ni povas simple ignori lian version aŭ kanton. Ankoraŭ pli malbone estas, se tiujn vortojn uzas prozisto. Tio estas jam rekta kontraŭesperanta atako, kaj redaktoro devas anstataŭigi tiujn ĉi vortojn per puraj Esperantaj ekvivalentoj.

Tamen la ideo titoli neologisme organon de SEJM superas ĉion. Nenio simila estis en Esperanta historio!

Nun ion pri la vorto "kurta". Kompreneble la Fundamento ne havas ĝin. Ne mencias ĝin ankaŭ la rusa - Esperanta vortaro de Bokarev. En la Esperanta - rusa vortaro de Bokarev kaj Grigorjev tiu ĉi vorto havas noton "nov.", kiu laŭ la aŭtoro klarigo (p.24) ne havas rekomendan karakteron por uzi ĝin. Kial do ĝi estis uzita? Kial oni prepagandas ĝin?

Ĉi-somere en BET-17 okazis kunveno, dediĉita al la problemoj de senbezonoj kaj neologismoj. Elpaŝis multaj kamaradoj, iliaj opinioj estis unuanimaj: la senbezonoj kaj neologismoj estas grava danĝero por Esperanto, kaj necesas eviti ilin ĉie, kie eblas. K-do Podkaminer konklude esprimis komunan opinion, ke la diskuto ne estas plu daŭrigenda, ĉar ĉio estas klara. Kaj nun iu eltiris el rubujo la "KURTE"! Ĉu ne eblas simple, kompreneble kaj Esperante: MALLONGE? Bone sonis KKK, bone sonus URĜA, TTT, EKSPRESO - ĉu mankas en Esperanto, trafaĵoj esprimoj kaj vortoj? Por kio estis tiu rekta atako kontraŭ Esperanto, kruda kripligado de la lingvo? Hontinde!

Mi esperas, ke la fuŝa kaj erara titoligo de la informilo estos korektita, kaj ĝi ricevos honeste Esperantan titolon, kiun ĝi meritas. Vivu la pura Zamenhofa Esperanto, kaj vivu ĝi ne "kurte", sed eterne!

G.Gercikov (Talgar).

KOMENTO DE LA REDAKTORO. Espereble la legantoj konsentos, ke la argumentado de la artikolo ne estas senriproĉa. Ekzemple, la aserto, ke la rusa - Esperanta vortaro ne mencias la vorton "kurta", estas simple malvera: la traduko "kurta cirkvito" por "korotkoje zamikaniĵe" estas donata eĉ dufoje (pp. 131, 179). Kaj en la Esperanta - rusa vortaro post la klarigo pri nerekomendga karaktero de neologismoj sur la sama paĝo 24 estas averto, ke ankaŭ refero de neologismo al fundamenta vorto (niakaze: kurta=mallonga) ne nepre estas rekomenda. Dĉ elekto de tiu aŭ alia sinonimo ne estas kategorie preskribata kaj povas dependi de lingvaj gustoj de la uzanto, kunteksto kaj aliaj cirkonstancoj.

La partoprenintoj de la menciita kunveno en BET ne ofendiĝu, se mi diros, ke ilia rezolucio ne povas esti deviga por SEJM. Sed por mi ĉiujn punktojn super "i" pri la levita demando, estus bone, se niaj kolegoj el "Kurte" klarigus sur niaj aŭ siaj paĝoj, kial ili preferis ĝuste tiun ĉi titolon.

Kaj laste. La artikolon de G.Gercikov mi decidis ennumerigi ne por revivigi la diskuton pri neologismoj, sed pro tio, ke mankas pli indaj kontribuajtoj en la redakcia teko. Do mi petas vin pli aktive sendi interesajn, variajn kaj aktajn materialojn. Se bonaj artikoloj ne sufiĉos, mi estos devigita nutri la legantojn per tekstoj malfortaj kaj hazardaj. Do ĉio dependas de vi!

MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO

LA 19-AN DE DECEMERO

iĝos 70-jara la Ĝenerala sekretario de CK KPSU k-do L.I. Breĵnev. La kluboj ne forgesu sendi gratulleterojn kun laŭebla mencio ankaŭ de sia kontribuo al la afero de paco kaj interpopola kompreniĝo.

LA REDAKCIO RICEVIS

- la informilon "Lumo verda" N^o6(13), organon de la interurba klubo "Antauen", sendatan al ni laŭ decido de la 10-a SEJM-Konferenco. En la numero: artikolo de la prezidanto de "Antauen" B.G.Kolker pri la unujara jubileo de la klubo, konstanta rubriko "La klubanoj prezentas sin", represetaj el "Starto" gramatikaj artikoloj de akademiisto K.Piŝ, rakonto de M.Ohotin pri la veturo en Bulgariion k.a.
- "Informilon" N^o1 de Kolektanta fako. Ĝi enhavas organizajn novaĵojn, anoncojn kaj adresaron de 41 aliĝintoj al la fako.

KONKURSO PRI KOMENCITA RAKONTO

Por eventuala lernolibro por progresantoj estas antaŭvidata jena ekzerco: al la kursano estas proponata intereso komenco de rakonto (iom da frazoj), kiun la kursano mem devas daŭrigi kaj fini laŭ sia bontrovo. Do estas anoncata konkurso pri tiaj rakontokomencoj. La venkantoj ricevos premiojn. Ĉiuj taŭgaj konkursaĵoj estas uzotaj en la lernolibro ĉu senŝanĝe, ĉu en modifita formo, al kio la sendontoj devas doni sian konsenton. La nomoj de ĉiuj kontribuontoj estos menciitaj en la antaŭparolo al la lernolibro. La limdato de la konkurso estas la 1-a de majo 1977, sed la kontribuajtoj estos akceptataj ankaŭ poste. Sendu ĉion laŭ la adreso: 450025 UFA, abonkesto 162, Esperanto-klubo. Elprovu vian inventemon kaj spritecon!

† ATENTON, GEKAMARADOJ ESPERANTISTOJ!

Krasnojarska urba E-klubo akceptas mendojn por produktado de E-emblemoj-surkudraĵoj, kojnoflagoj, flagetoj.

La kvalito de la emblemoj estas unuaranga, ĉio estas produktata industrie.

La kondiĉoj: La dezirantoj ion mendi devas sendi la skizon aŭ skribe klarigi ĝian ideon. Nia desegnisto preparas la definitivan skizon. Post ties konfirmo fare de la mendanto, la emblemo estas produktata en la necesa kvanto (ne malpli ol 50 ekz.) - ju pli multe, des pli oportune por la produktantoj. La preta varo estas sendata kontraŭ mono. La tempo de mendoplenumo - 1 monato.

La mendanto devas garanti elaçeton de la tuta varo (post konfirmo de la skizo).

Proksimumaj prezoj:

- 1) surmanika emblemo (kun ĉirkaŭkudro) - 1-00;
- 2) surbrusta emblemo (kun ĉirkaŭkudro) - 0-50;
- 3) ceteraj specoj de la produktaĵoj (kojnoflagoj, flagetoj) - laŭ interkonsento.

Krome la klubo proponas plej diversajn E-emblemojn de ĝenerala karaktero. La specimenojn (kopiojn) eblas ricevi laŭ la kluba adreso. Plue - ĉio laŭ la simpla skemo: mendo - mono - produktaĵo.

La adreso de la klubo: 660075 Krasnojarsk, ab. jaŝĉ. 2420, E-klub, otdeĵ smabĵenija.

RADIOELSENDO PRI ESPERANTO KAJ ZAMENHOF

okazis la 27-an de oktobro en Bijska teknikumo de mekanika prilaboro de ligno, daŭro - 10 min. En la sama teknikumo komenciĝis E-rondeto. La aŭtoro de la elsendo kaj gvidanto de la rondeto estas I.P. Korolĵov.

KIU INVITOS?

15-persona grupo de komencantaj esperantistoj el Ukrainio (15-16-jaraj gelernantoj) volonte vizitos vian urbon dum la vintraj ferioj, se via klubo helpas per noktado dum kelkaj tagoj. La proponojn (precipe el Moskvo, Leningrado, Tallinn, Riga, Ufa...) atendas Anna Vojnaroviĉ, 343871 Avdejevka-3 Doneckoj obl., ul. Poŝtovaja 23, GorSPTU-43, interklub "Esperanto".

NIAJN GRATULOJN

al la E-familio de Tatjana kaj Mikaelo Bronŝtejn (Tiĥvin), ĉe kiuj la 2-an de novembro naskiĝis filo!

La informilo estas uzenda nur enlande! Fintajpita 20.11.76.
Ĉiujn materialojn por "Aktuale" sendu al la redaktoro laŭ la adreso:
121019 Moskvo G-19, do vostrebovanija, Aroloviĉu Viktoru Semjonoviĉu.